

LA SANKTA FAMILIO - 27-an de decembro 2015

JESUO ESTAS RETROVITA DE LA GEPATROJ SIDANTA INTER LA LEĜINSTRUISTOJ – Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Luko 2, 41-52

La gepatroj de Jesuo kutimis pilgrimi ĉiujare al Jerusalemo okaze de la paska festo. Kiam Jesuo iĝis dekdujara, ili supreniris tien laŭ la festa kutimo. Kiam la festo finiĝis, ili ekiris returnen kun la aliaj. Sed la eta Jesuo restis en Jerusalemo, kaj la gepatroj tion ne rimarkis. Ili supozis, ke ankaŭ Jesuo estas en la karavano. Post unu-taga marŝado, ili serĉis Lin inter parencoj kaj konatoj. Ne Lin trovinte, ili reiris al Jerusalemo por Lin serĉi. Tri tagojn poste ili trovis Lin en la templo, sidanta meze de leĝinstruistoj, ilin aŭskultante kaj ilin demandante. Ĉiuj miregis pro Lia saĝo kaj Liaj respondoj. Ankaŭ Liaj gepatroj, Lin ekvidante, miregis, kaj Lia patrino diris al Li: "Ido, kial vi kondukis tiel kun ni? Jen, via patro kaj mi, angoroplenaj, serĉadis Vin". Li respondis: "Kial vi Min serĉis? Ĉu vi ne sciis, ke estas Mia devo zorgi pri la aferoj de la Patro Mia?". Sed ili ne komprenis la signifon de tiuj vortoj. Poste Jesuo reiris kun ili al Nazareto kaj fidele obedis ilin. Lia patrino retenis ĉiujn tiujn aferojn en sia koro. Dume Jesuo kreskadis, kaj progresis en saĝo kaj graco, antaŭ Dio kaj antaŭ la homoj.

Legante la evangelion, por ĝin kompreni ni ĉiam konsciu, ke ĝi ne rilatas kronikon, sed teologion, ĝi ne rakontas faktojn, sed la veron, ĝi ne transdonas historion, sed kredon.

Tial la evangelio estas ĉiam senkondiĉe aktuala.

Tio estas aparte necesa pri la ĉi-dimanĉa teksto de Luko, konata kiel la perdo kaj la retrovo de Jesuo en la templo. Tial ni interpretu la indikojn donitajn de Luko por komprenigi sian mesaĝon.

Kaj kion li volas komprenigi? La grandan reziston kaj la akran seniluziigon de la juda popolo rilate al Jesuo, ĉar Jesuo ne sekvas la tradicion de la prapatroj, sed establas rilaton tute novan.

Ni legu la evangelian tekston: *"La gepatroj de Jesuo"*. ...Ĉiuj rolantoj de ĉi tiu epizodo estas sennomaj. La sola nomato estas Jesuo. Kiam rolanto estas sennoma, tiu reprezentas ion. Luko ne celas Marian kaj Jozefon, sed la tutan Izraelan popolon. *"...kutimis pilgrimi ĉiujare al Jerusalemo okaze de la paska festo..."*. Estis tri la solenaj festoj postulantaj pilgrimadon al Jerusalemo: Pasko, Pentekosto kaj la Kabanoj. *"...Kiam Jesuo iĝis dekdujara..."*. Kial tiu detalo? Ĉar Luko en Jesuo vidas la figuron de unu el la grandaj profetoj de la Izraela historio, Samuelo, kiu ankaŭ, laŭ la tradicio, unuafoje profetis dekdujara.

"...ili supreniris tien laŭ la festa kutimo. Kiam la festo finiĝis, ili ekiris returnen kun la aliaj. Sed la eta Jesuo restis en Jerusalemo, kaj la gepatroj tion ne rimarkis...". Tio sonas iom stranga: kiel povas okazi, ke restas Jesuo kaj la gepatroj ne rimarkas? la filoj ja sekvas la gepatrajn spurojn. Sed estas ĝuste tiu la novaĵo prezentita de Jesuo.

"... Ili supozis, ke ankaŭ Jesuo estas en la karavano. Post unutaga marŝado, ili serĉis Lin inter parencoj kaj konatoj. Ne Lin trovinte, ili reiris al Jerusalemo por Lin serĉi..."

Do, ankoraŭ strange: la familio ne rimarkas, ke Jesuo ne kunestas. Luko, en la komenco de sia evangelio, anoncanta, ke naskiĝos Johano Baptisto, skribis, ke li kondukos la korojn de la patroj al la idoj; tio estis citaĵo el profeto Malaĥi (Mal. 3, 23), kiu kompletiĝis per ... kaj la korojn de la idoj al la patroj (Mal. 3, 24).

Luko forlasas la duan versiklon. La malnovo, la paseo, la novon komprenu. Ne la novo la paseon sekvu.

"...Tri tagojn poste ili trovis Lin en la templo,, sidanta meze de leĝinstruistoj...". Tio memorigas la libron de Sirah: "La saĝo laŭdas sin mem, fieras en la mezo de sia popolo" (Sir 24,1).

Do Jesuo estas la bildo de la saĝo de Dio.

...ilin aŭskultante... kaj..." eĉ ...ilin demandante... Dekdu-jara li demandas la leĝinstruistojn. *"Ĉiuj miregis pro Lia saĝo kaj Liaj respondoj"*. La traduko "miregis" estas milda: la originalo entenas ankaŭ la ideon de ĝeniĝo: la respondoj de Jesuo ilin tute konfuzis.

Ankaŭ liaj gepatroj, Lin ekvidante, miregis, kaj Lia patrino (Maria, la patrino de Jesuo, ne prezentata per sia nomo, sed bildo de la Izraela popolo) diris al Li, erarante dufoje: "Ido, (jen la unua eraro, tiu vorto implicas, ke la

ido estas bebo, tute dependanta de la patrino), *kial vi kondukis tiel kun ni? Jen, via patro... (jen la dua eraro: Jozefo ne estas la patro de Jesuo) ... kaj mi, angoroplenaj, serĉadis Vin*".

"...*Li respondis: En la tuta evangelio de Luko, ĉi tiu estas la sola elparolo de Jesuo al Maria, kaj ĝi estas severa riproĉo, kaj tio memorigas al ŝi la profetaĵon de Simeono "vian vivon trapikos glavo" (Lk 2,35): la glavo estas la parolo de Dio "Kial vi Min serĉis? Ĉu vi ne sciis, - sed ili estis avertitaj - ke estas mia devo zorgi pri la aferoj de la Patro mia?". Kaj tiu "devo" signifas, ke tio estas la volo de Dio: La Patro ne estas Jozefo. Kion intencas diri Jesuo? Mi ne sekvas la prapatrojn, la paseon, sed la Patron, kiu igas ĉion nova.*

"Sed ili ne komprenis la signifon de tiuj vortoj". Kial? Ĉar kiu rigardas la paseon ne komprenas la ekvenantan futuron. "Poste Jesuo reiris kun ili al Nazareto kaj fidele obeadis ilin. Lia patrino retenis ĉiujn tiujn aferojn en sia koro. Dume Jesuo kreskadis, kaj progresis en saĝo kaj graco, antaŭ Dio kaj antaŭ la homoj", kiel Samuele (Sam. 3,22). Ekde Betlehemo Maria komencis kompreni, kaj de patrino de Jesuo iĝis disĉiplo de Kristo.